PILO-PRESS
Internacia
Informservo

N-ro 20/1974 10 junio 1974
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

## Novaĵoj pri la 59-a UK en Hamburgo

### Renkontiĝo kun federacia kanceliero

Bonn (webo) Viziton al Bonn faris D-ro Werner Bormann, prezidanto de GEA kaj de la LKK, kaj s-ino Elsbeth Bormann, membro de la GEA-estraro kaj de LKK, ŝarĝita en ambaŭ funkcioj pri informado kaj havanta bonajn kontaktojn al gravaj politikistoj. Ili havis la bonŝancon renkontiĝi kun la federacia kanceliero Helmut Schmidt kaj povis mem danki al li pro lia salutvorto donita al la UK malgraŭ la tempopremo inter lia nomigo kaj la redaktofino de la kongreslibro.

Pritraktoj estis faritaj kun la koncernulo en la oficejo de la kanceliero "Bundeskanzleramt" pro ĉeesto de politika eminentulo dum la inaŭguro en Hamburgo, kiu povos transdoni la mesaĝon de la kanceliero rekte al la kongresanoj.

Ges-roj Bormann kunsidis ankaŭ en la ministeriode la Alta Protektanto de la UK, tiu por klerigo kaj scienco, pro la rekta komuniko de la salutvortoj de ministro Helmut Rohde dum la inaŭguro al la kongresanoj. Per tiuj intertraktadoj la du LKK-membroj volis atingi, ke dum la UK-inaŭguro la politikaj eminentuloj el Bonn estu same bone reprezentataj kiel la politikaj eminentuloj el Hamburgo.

Alia interparolo pri la UK okazis kun prof. D-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de la por la kongreso respondeca mondorganizaĵo.

Plia ero de la laborprogramo en Bonn pri la UK en Hamburgo estis detala kaj fruktodona ideinterŝanĝo pri la gazetara laboro de la kongreso inter Ulrich Lins, komisiito de la UEA-estraro pri la kongresa gazetara servo, kaj s-ino Bormann, kiu en LKK prilaboras la informankaj gazetaran fakon.

### Esperanto-Informoj por diplomatoj

Bonn (webo/pp) Kiel ni jam antaŭanoncis, Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio en Bonn, invitis ĉiujn ambasadorojn resp. la Unuajn Sekretariojn aŭ la Kulturataŝeojn de la ambasadoj en Bonn al akcepto la 6-an de junio 1974 en sia rezidejo. Ĉeestis 30 diplomatoj, kiujn prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, kaj D-ro Werner Bormann, prezidanto de la LKK, donis superrigardon pri la Esperanto-movado, ĉefe pri la 59-a UK en Hamburgo.

### Elekto de Komitatanoj B

Rotterdam (pp) La 8-an de junio okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj por la elekto de Komitatanoj B por la oficperiodo 1974-1977.

746 ĉefdelegitoj kaj delegitoj partoprenis en la elekto de 6 komitatanoj el 14 kandidatoj. Elektitaj estas:
D-ro Ivo Lapenna (622 voĉoj), D-ro Régulo Pérez (539 voĉoj), Marianne H. Vermaas (510 voĉoj), Jean Thierry (430 voĉoj), Karl Söderberg (348 voĉoj), Andrzej Pettyn (322 voĉoj).

(Pro eventuala eraro en la ciferoj Pilo-Press antaŭpetas pardonon, ĉar ili estis transdonitaj telefone!)

Iniciato ĉe germana SPD

Bonn (webo/pp) Kiel ni jam informis, la itala Socialdemokrata Partio (P.S.D.I.) proponis oficiale, ke la samtendencaj partioj (enhavantaj la registaran povon en sufiĉe multaj landoj) ekzamenu la eblojn, kiel ili povus faciligi siajn kontaktojn kaj la interkomprenan problemon uzante Esperanton. Tiu iniciato de la partio estis instigita de D-ro Menabene el Romo kaj nun estas oficiala elpaŝo de la partio P.S.D.I.

Por certigi la pritrakton de la itala iniciato en la germana Socialdemokrata Partio (SPD) la membro de la estraro de GEA, s-ino Elsbeth Bormann, insistis ĉe pluraj gvidantoj de tiu partio. Surbaze de tiuj atentigoj nun la departemento pri internaciaj aferoj de la federacia estraro de SPD devas ekpritrakti la aferon. Unua persona kontakto kaj interparolo kun oficisto de la partiestraro okazis la 7-an de junio 1974 en la particentro en Bonn.

Por subteni tiun agadon estus helpe, se tiuj esperantistoj kaj SPD-anoj, kiuj siavice iniciatis por Esperanto oficiale ion en tiu partio (ekzemple rezolucioj de partikonferencoj k.s.) informus la departementon pri internaciaj aferoj ĉe la partiestraro en Bonn. Kopiojn oni bonvolu sendi al s-ino Bormann kiel materialon por pluaj jam interkonsentitaj kunsidoj en tiu afero.

Similaj intertraktoj komenciĝis kun la liberaldemokrata partio F.D.P. Estas urĝe necese ektrakti kun la kristandemokratia partio CDU por entute antaŭenigi Esperanton en tiu tre grava medio.

Jam komence de aprilo Ulrich Brandenburg informis, ke li faris "iniciativan proponon" al la asembleo de subdistrikto Münster de SPD kun jena enhavo:

"La partia asembleo de la subdistrikto decidu: La partia estraro estas petata ellabori lingvopolitikan koncepton rilate al la estonta evoluo de la Eŭropaj Komunoj. Eventuale oni rekomendas, starigi ĉe la partia estraro lingvopolitikan laborrondon."

***************

UEA-prezidanto sin distancigas de rekorda deficito

Rotterdamo (pp) En Cirk. Letero de la 13 majo 1974 n-ro 6/1974 la prezidanto de UEA, prof. D-ro Ivo Lapenna skribas i.a.:

"Komence de aprilo okazis en la CO la kutima kunsido de la Estraro. Ĝi pritraktis multajn demandojn, parte ankaŭ tre gravajn. Mi aldonas resumon de la decidoj. Jam nun mi povas informi, ke la deficito en 1973 estis 59 500 gld. Kvankam mi komprenas, ke pluraj faktoroj kontribuis al tiu deficito, tamen mi opinias, ke ĝi neniel estas praviġebla, precipe ne, se oni prenas en konsideron la rezultojn de la laboro de la CO en 1973. Tial, dum la kunsido mi sentis min devigita deklari, ke mi distancigas min de la financa administrado de UEA en 1973, pri kio respondecas la estrarano pri financoj s-ro E.J. Woessink. Detalojn mi donos al la nova Komitato en Hamburgo. Ankaŭ la verko "Esperanto en Perspektivo" ne povos aperi en junio, kiel promesite, pro haltoj en la presejo kaj en la CO. Post sufiĉe longa diskuto la teknika redaktoro, D-ro V. Sadler, promesis ke la verko aperos plej malfrue fine de decembro 1974, kaj surbaze de tiu promeso, mi konsentis ne retiri miajn aŭtor-ajn rajtojn rilate la partojn verkitajn de mi mem, kondiĉe ke la verko fakte aperu ĝis la fino de la jaro. Tiom por hodiaŭ."

## Kunlaboro kun la Ĉeĥa Packonsilantaro

Reciproka kunlaboro kaj apliko de Esperanto en la porpaca aktivado estis temo, kiun pritraktis kun la prezidanto de la Ĉeĥa Packonsilantaro, prof. Ant. Stejskal, la reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio la 16-an de majo en Brno. Por pliintensigi la ambaŭflankajn kontaktojn oni elektis tri funkciulojn de ĈEA en la superan organon de Ĉeĥa Packonsilantaro.

Okaze de la renkontiĝo la prezidanto de la Ĉeĥa MEM-sekcio kaj membro de IK MEM, O. Kníchal, transdonis al prof. Stejskal Honorinsignon kaj Diplomon de Mondpaca Esperantista Movado. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de EK Brno J. Vondroušek, ties MEM-peranto D-ro J. Šikula kaj la estro de la ER ĉe la Brno-metalfabrikoj, A. Balaŝ. La gazetaro raportis pri la renkontiĝo. (o.kn.)

## Novaj intensaj kursoj en FRG

Löhne (hb) Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) anoncas du novajn intensajn kursojn. La kurso en lingvolaboratorio de la Universitato Bochum okazos de la 22-a ĝis 26-a de julio 1974; simila kurso en Paderborn de la 21-a ĝis 23-a de oktobro 1974. Kompreneble oni tre ŝatus, se tiujn kursojn partoprenus ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Anoncu vin ĉe la prezidanto de AGEI, Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1.

## Interesa ILUS-kunveno tuj antaŭ la 59-a UK

Hamburgo (hb) La laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvocibernetiko" (germana mallongigo ILUS), subgrupo de Asocio pri Programita Instruado, okazigos sian 2-an Laborejan Interparolon la 27-an de julio, posttagmeze, en la Kongresa Centro de Hamburgo. Oni intence elektis tiun daton, por ebligi al la partoprenantoj la ĉeeston en la Solena Inaŭguro de la UK. Ĉefa parolanto en la ILUS-kunveno estos prof. D-ro Helmar Frank, kiu la semajnon antaŭe partoprenos la Internacian Ferio-Kurson de s-ro Friis en Helsingör por lingve perfektiĝi.

UK-anoj estas kore bonvenaj en la ILUS-konferenco, sed oni avertas, ke la ĉefa lingvo estas la germana. Interesuloj anoncu sin ĉe Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1.

## Artikolo kaj politiko

Romo. La itala ministro pri eksterlandaj aferoj, deputito Aldo Moro, oficiale klarigis ĉe la itala parlamento, ke Italujo akceptas la franclingvan version de la decido de Unuiĝintaj Nacioj koncerne la finon de la irsraela okupado de arabaj teritorioj.

La itala deklaro estis akceptita kun aparta favoro de la arabaj landoj, ĉar inter la franca kaj la angla versio ekzistas diferenco, unuavide ne grava, sed efektive esenca: fakte, pro la diversa strukturo de la du lingvoj, dum la angla teksto invitas Israelon retiriĝi "el okupitaj teritorioj", la franca invitas retiriĝi "el la okupitaj teritorioj." Simpla artikolo sufiĉas, por doni tute alian signifon, ĉar laŭ la franca teksto Israelo devus forlasi ĉiujn teritoriojn okupitajn, dum laŭ tiu angla ĝi devus forlasi nur kelkajn el ili.

## Nova numero de JUNA AMIKO

Haveblas nun n-ro 3 de la 1a jarkolekto de la internacia lerneja Esperanto-revuo JUNA AMIKO, prezo 1,- DM. Per tiu numero estas kompleta la 1a jarkolekto konsistanta el 3 numeroj. Ĉiuj tri numeroj ankoraŭ estas haveblaj kontraŭ 3,- GM ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Novaĵoj pri 30-a IJK en Münster

Münster (pp) Jam 172 partoprenantoj el 25 landoj estas sur la listo de aliĝintoj. Grandaj malfacilaĵoj trovi loĝigeblojn supozeble baldaŭ devigos nin jam malakcepti aliĝojn.

Grandan helpon en la organiza laboro signifas la konfirmo pri relative bona subvencio de la Eŭropa Junular-Fonduso.

Kelkaj novaĵoj estas menciindaj el la programo: Prof. Dro Helmar Frank definitive konsentis prelegi pri la temo "Lingvopolitiko por Eŭropo". Cetere konsentis gvidi laborgrupon Paul Peeraerts (Elokventeco kaj Praktika Edukado), Hans-Michael Maitzen (Internacia Junularinterŝanĝo, Junulara Politiko), Wim de Smet (Instruado de Naturscienca j Fakoj). Kiel diskutbazon por eventuala laborgrupo Stefan McGill disponigis skriban referaĵon pri la temo "Apartigo en la Edukado".

En kadro de la paralele okazanta seminario "Lingvo kaj Socio" Prof-o Jan Knappert prelegos pri la temoj "Ŝtatoj kaj lingvoj en ili parolataj" kaj "Problemoj de komunikado en junaj respublikoj de Afriko".

Ankaŭ la distra programo ne limiĝos al ekskurso kaj "ŝicenfesto". La drama sekcio de Studenta Esperanto Klubo Zagreb prezentos komedion de la angla verkisto Joe Orton "Kion vidis la hotelservisto".

En la kazo ke iu havas la intencon telefone atingi la LKK, li devas alkutimiĝi al nova telefonnumero, nome (02504) 8360.

30-a Internacia Junulara Konferenco, D-44 Münster, Mondstr. 3

********************

Esperanto en la radio

Varsovio. Ne ĉiuj aŭskultantoj estas kontentaj pri la nova kadra programo. Tion ni eksciis el la lasta leterkesto. Iuj bedaŭras, ke en la posttagmezaj elsendoj mankas la Esperanto-Ekspreso kaj la Koncerto de bondeziroj. Ankaŭ la aŭskulteblеco por la 3a,vespera programo ne ĉie estas bona. Nu, ĉi tie en Nürnberg tiu programo estas relative bona aŭdebla sur meza ondo 200 m. La Esperanto-redakcio insiste petas ĉiujn aŭskultantojn skribi pri la aŭskulteblеco kaj siajn komentojn. Pilo-Press proponas, ke ĉiuj aŭskultantoj skribu speciale sian opinion pri la nova kadra programo, ĉu ili ŝatus aŭskulti al Esperanto-Ekspreso kaj al Koncerto kun bondeziroj ankaŭ en la dimanĉa resp. lunda posttagmezoj? Iuj aŭskultantoj proponis, ke regu"pli ŝerca tono"en la Koncerto kun bondeziroj. La redakcio konsentas al tio, sed la ŝercojn devas fari la aŭskultantoj mem, ĉar "ni ne volas eksplodiĝi en la rolo de elefanto en vendejo de porcelanaĵoj kaj ne ofendeti iun", estis la redakcia komento. - Ankoraŭ estas tempo por partopreni en la nova konkurso de Pola Radio. Vian respondon vi devas sendi ĝis la 15-a de junio 1974, legu la konkursan tekston en la antaŭaj PP-numeroj kaj en Germana Esperanto-Revuo N-ro 2/1974. - Dum majo 1974 la redakcio ricevis entute 245 leterojn kaj poŝtkartojn, inter ili 39 de novaj aŭskultantoj. 137 korespondaĵoj venis el okcidentaj, 108 el orientaj landoj. La pinton tenas Sovetunio kun 39, en balanco estas la korespondaĵoj el GDR kaj FRG kun po 32. Cetere, de post kelkaj semajnoj ankaŭ la Esperanto-redakcio de Pola Radio uzas la oficialan nomon de Federacia Respubliko Germanujo. En la pasinteco oni uzis konstante la esprimon "Germana Federacia Respubliko". Berno. D-ro A. Baur komencis novan prelegserion pri la svisa pentro-arto. Vieno. La ĉi-foja aktuala komentario analizis la rolon de Aŭstrio kaj de federacia kanceliero Kreisky en la solvo de la proksimorienta konflikto.